Universala Esperanto-Asocio

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# Landa parad'

## Kalejdoskopo de la regiona, landa kaj loka agado de nia mondvasta komunumo

Projekto lanĉita rn 2018 sub la nomo GAMO.

# AFRIKO

Stefan MacGill, Budapeŝto 2019

Versio 4: novembo 2019

Versio 3: aŭgusto 2019

Versio 2: junio 2018

Versio 1: januaro 2018

© Universala Esperanto-Asocio
© Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# Landoj en Afriko

### Kontinenta resumo:

Temas pri Sub-Sahara Afriko, do sen la landoj de la Magrebo, kiuj apartenas al MONA. En la raporto la siglo0 por la Afrika Komisiono estas AK.

Ni listigas komence 18 landojn de Afriko, kiuj aperas en la Jarlibro kun minimume unu delegito. El tiuj:

- 8 havas Landan Asocion aliĝintan al UEA (Benino, Burundo, Ebur-bordo, Kongo DR, Madagaskaro, Niĝerio, Sud-Afriko kaj Togolando)
- 9 havas Asocion, kiu ankoraŭ ne petis aliĝon (Angolo – sen delegito, Ĉado, Ganao, Kameruno, Kenjo, Malio, Senegalo, Tanzanio kaj Ugando)
- 1 afrika lando havas kotizperanton (Sud-Afriko), indas, ke pliaj havu, por eluzi la novan kotizsistemon kaj pretigi kandidatojn por subteno per Fondaĵo Canuto aŭ aliaj rimedoj kaj havu aliron al la landa membrolisto.
- 1 afrika lando havas ĉefdelegiton (Sud-Afriko), indas, ke pliaj havu por modernigi la reton kaj havu aliron al la landa membrolisto de tiu lando. ekz. en Benino, Kongo DR, Madagaskaro, Niĝerio, Tanzanio, Togolando. Sub la supozo, ke la Delegita reto iel pluvivos.

TEJO havas sekciojn en Benino (BOJE), Burundo (JEBUO), Kongo DR (DKEJO), Madagaskaro (JEOM), Togolando (JOTE), ILEI havas sekciojn en Benino, Burundo, Senegalo, Tanzanio kaj Togolando (5 landoj), reprezentanton en Ganao kaj kontaktpersonojn en Kenjo, Niĝero kaj – do la instruistoj figuras en 9 landoj.

| Lando | UEA-LA | Membroj * | Ĉefdelegito | Komitatano | TEJO | ILEI |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Benino | 2002 | 74 | Estu! | OBS | BOJE | Sekcio |
| Burundo | 2008 | 115 | Ne estas | KOM | JEBUO | Sekcio |
| Ĉado | 2005 | 3 | Ne estas | -- | -- | -- |
| Eburbordo | 1989 | 1 | Estu! | Estu OBS! | -- | -- |
| Ganao | 1992 | 4 | Estu! | -- | | Rep. |
| Kameruno | 1991 | 3 | -- | -- | -- | -- |
| Kenjo | 2009 | 1 | Ne estas | -- | Kontakto | KPersono |
| Kongo DR | 1966 | 74 | Estu! | Estu OBS | DKEJO | -- |
| Madagaskaro | 2006 | 7 | Ne estas | Estu OBS | JEOM | -- |
| Malio | 2005 | 2 | Ne estas | -- | -- | -- |
| Niĝerio | 2005 | 53 | Estu! | Estu OBS | -- | -- |
| Niĝero | Ekzistas | 1 | Ne estas | -- | -- | Rep. |
| Senegalo | 2001 | (25) | | -- | | Sekcio |
| Sud-Afriko | 1969 | 25 | Estas | Estu OBS | -- | KPersono |
| Svazilando | -- | 0 | Ne estas | | -- | -- |
| Tanzanio | Ekzistas | 6 | Estu! | -- | | Sekcio |
| Togolando | 1995 | 68 | Estu! | Estu OBS | JOTE | Sekcio |
| Ugando | Ekzistas | 1 | Ne estas | | -- | -- |
| **18 landoj** | **8 LA** | **463** | **1 ĈD** | **1 K,1 OBS** | **5 sekcioj** | **9 landoj** |

* AM+ IM fine de 2018 (krom Senegalo, kiu estas por 2019)

## Laborplano akceptita de la nova Afrika Komisiono:

- Instigo al organizado kaj raportado pri ĉeestaj kaj perkorespondaj Esperanto-kursoj
- Helpo al la fortigado de lokaj kluboj, instigo al la maturaj landoj (kie ankoraŭ ne estas LA) efektivigi aliĝon al UEA.
- Revenigo de la Kotdivuara Esperanto-Asocio (Ebur-Bordo) kiel Landa Asocio de UEA.
- Malferma alvoko al landaj asocioj kaj grupoj por organizo de la 8-a AKE.
- Instigo al afrikaj e-istoj por aliĝo kaj membriĝo en UEA.
- Prelegoj, partopreno en konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de UEA en la kontinento.
- Havigo al petantoj de lerno- kaj instru-materialoj.
- Produktado de afrikaj filmoj, muzikoj kaj informiloj en afrikaj kaj Esperanta lingvoj.
- Sendo de instruistoj al iuj afrikaj landoj por lertigi esperantistojn dezirantajn iĝi instruistoj.
- Pretigo, disdono de diversaj varbiloj kaj informiloj.
- Reklamo de Esperanto en lernejoj kaj sociaj retejoj.
- Instigo al kreo de TEJO-, ILEI-sekcioj kaj virinaj grupoj.
- Kuraĝigo kaj subteno al virinaj kunvenoj.
- Organizo de trejnseminarioj intence al gejunuloj.
- Instigo al afrikanoj partopreni retkursojn kaj ekzamenojn de ILEI.
- Prezento de Esperanto dum sociaj forumoj en Afriko.
- Interesado de turismaj agentejoj kaj oficistoj pri Esperanto.
- Okazigo de diversnivelaj ĉeestaj Esperanto-kursoj.
- Alvoko al afrikaj landoj kandidatiĝi por organizi UK en Afriko horizonte de 2023.

Membroj de la komisiono troviĝas fine de ĉi tiu dokumento.

## Pliaj proponataj agadoj:

- UEA proponu al tiuj landoj sen retpaĝoj simplan ŝablonon, eble en la servilo de la CO, kie ili prezentu sin – egale ĉu kun aŭ sen landa asocio. Alie, la Afrika Komisiono donu lokon al landoj sen propra paĝaro. Landoj sen troveblaj aŭ funkciantaj retejoj: Benino, Burundo, Ĉado, Ebur-bordo, Ganao, Kameruno, Madagaskaro, Malio, Niĝerio, Niĝero, Senegalo, Svazilando, Tanzanio, Ugando. Troveblaj estas retpaĝoj nur por Sud-Afriko kaj Togolando. Evidente utila solvo por la aliaj estas paĝaro stariginda en la Afrika Komisiono.
- Spite la manko de paĝoj por LA, abundas bonaj afrikaj retpaĝoj; AK kompilu liston.
- UEA instigu la nomumigon de Ĉefdelegitoj kaj/aŭ kotizperantoj en 6 landoj: Benino, Eburbordo, Ganao, Kongo DR, Niĝerio, Tanzanio kaj Togolando. Parto de iliaj taskoj estos aktualigo de la delegitoj kaj kompilo de listoj de aktivuloj, kiuj petas membrigan helpon pere de Fondaĵo Canuto aŭ pere de la nova kotizsistemo.
- UEA akcelu kaj subtenu la aperigon de informiloj kaj instruiloj en la ĉefaj lingvoj de la kontinento (vidu la rekomendojn de la 6a AKE).
- UEA revenu al la kvin-punkta laborplano akceptita en AMO 29 en la 6a AKE por la eldonigo de lerniloj, fondo de asocioj k.a. kaj la ok-punktan decidaron de la 6a AKE (vidu revuon Esperanto, jan 2016, p. 7) – tio aperas fine de la nuna dokumento.
- UEA pretigu helpilojn kaj helpantojn por ricevi aliĝpetojn: ekz. el Tanzanio.
- UEA kun la Afrika Komisiono garantiu kiam necese 15 AM-kotizojn por landoj kun pli ol 25 enlandaj membroj kaj funkcianta asocio, por ke ili havu komitatan observanton (grava pro retaj voĉdonoj). Temas pri: Benino, Burundo, Eburbordo, Madagaskaro, Sud-Afriko, Togolando. Tio okazu ekde 2019.
- La Komitato ne akceptis la proponon fermi la Landan Asocion en Ebur-bordo, laŭ promeso de la Afrika Komisiono, ke ĝi provos starigi posteulan grupon. Rekomendindas, ke AK jarfine raportu al la Komitato la planojn aŭ progreson.

## Ĝisdatigoj por la eldono de junio 30, 2018

- La nombro de Membroj de UEA (Individuaj kaj Aligitaj) ĝisdatigitaj laŭ la ciferoj en la maja revuo *Esperanto*, 2018
- Ĝisdatigo de la ciferoj pri la pagipovo de landoj (nominala MEP – angle GDP)
- Tabelo de pagipovo (MEP) por afrikaj landoj laŭ kvar kategorioj.
- Ĝisdatigo de la proponoj por laborplano pro Afrika agado.

## Ĝisdatigoj por la eldono de aŭgusto kaj novembro 2019

- La nombro de Membroj de UEA (Individuaj kaj Aligitaj) ĝisdatigitaj laŭ la ciferoj en la maja revuo *Esperanto*.
- Ĝisdatigo de UEA-membroj, laŭ la finciferoj de 2018 (en RE majo 2019).
- Aldono de kontaktinformoj por la sekcioj de ILEI.
- Aldono de informoj pri la kategorioj por la nova kotizsistemo de UEA.
- Nova kunlaboro kun TEJO celas bonigi la informojn pri la junaj esperantistoj.
- Ĝisdatigo de la informoj pri observantoj post Lahtio (nov 2019)

# Benino

**Landkodo:** BJ**. Mono:** XOF (CFA)**. Telefonkodo:** 229**. Ĉefurbo:** Porto-Novo. **Kat.:** 1.

**Areo:** 114 mil $km^2$ (100a en la mondo). **Loĝantaro**: 10.9 milionoj (82a); 0.7 milionoj en Cotonou.
**Denseco**: 95 homoj / $km^2$ (120a)
**Pokapa MEP:** $ 818 do en la 168a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas, senkritika, aktuala.

**Landa Asocio:** Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABE), 2000 (aliĝo al UEA 2001). La nuna situacio neklaras. Membroj: UEA: AM 50 IM 24, Sume; 74. Siatempa deklaro: 500
**LA-adreso:** BP 416, Lokossa (Mono)
**LA retadreso:** associationabee<ĉe>yahoo.fr

**LA-hejmpaĝo:** http://esperanto-benino.webs.com Sed ne funkcias, ĉu sendu al Afrika paĝo?

**Membraro en UEA:.** 2018: 24. 2007: 11. FC 2018: 20. 2007: 11.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 45.87 (LA), 2,02 (IM)
**Ĉefdelegito:**.Ne estas, povus esti.
**Kotizperanto:**. Ne estas.
**Komitatano de UEA:** Observanto Latifou Gbadamassi
**Sidejo:** Iam estis du oficejoj.

**Delegitoj:** 7 personoj (1 ĈD, 10 D, 0 VD, 9 FD) en tri urboj: Alaphoué, Cotonou, Lokossa.
**Aliaj asocioj:** TEJO (BOJE ekde 2015), ILEI (sekcio).
**Internaciaj aranĝoj:** La 2a Afrika Kongreso en 1991 en Kotonuo.

# Burundo

**Landkodo:** BI**. Mono:** BIF (franc)**. Telefono:** 257**. Ĉefurbo:** Buĝumburo (Bujumbura). **Kat**.: 1

**Areo:** 28 mil km² (142a en la mondo) **Loĝantaro**: 11.2 milionoj (86a); 0.3 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 481 homoj / km²
**Pokapa MEP:** $ 273 do en la 193a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas, senkritika, aktuala.

**Landa Asocio:** Association Nationale d'Esperanto au Burundi (ANEB), 2005 (aliĝo al UEA 2008). Prez. Manirakiza Aimé-Patrick. Membroj: AM: 100, IM 15, Sume 115.
**LA-adreso:** B.P. 170, Rumonge, Burundo
**LA retadreso:** anebsiege<ĉe>gmail.com kaj apmanirakiza<ĉe>gmail.com
**Telefono:** +25779813485
**LA-hejmpaĝo:** Ne funkcias (sama loko kiel Benino), ĉu sendu al Afrika paĝo?

**Membraro en UEA.** 2018: 13. 2007: 12. FC 2018: 8. 2007: 12.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 8,48 (LA) 0,80 (IM)
**Ĉefdelegito:**.--
**Kotizperanto:**.--
**Komitatano de UEA:** Ne estas. Rajtus esti observanto.
**Sidejo:** Adreso en Rumonge. Oficejo?

**Delegitoj:** 3 personoj (1 D, 2 FD) en 1 urbo: Rumonge.
**Aliaj asocioj:** TEJO (JEBO ekde 2008);
ILEI: (sekcio) Evariste Bigirimana, <bigevariste<ĉe>gmail.com>
**Internaciaj aranĝoj kaj kontaktoj:** Vizito de la TEJO-prezidanto en 2015.
Jérémie Sabiyumva: Estrarano de UEA ekde 2019. Membro de la Afrika Komisiono.
Okazigos la 7an Afrikan Kongreso de Esperanto, sub egido de UEA en decembro 2019, kune kun la AMO-seminario numero 61. Vidu la paĝon de la Afrika Komisiono: https://www.esperanto-afriko.org/afrikakomisiono.htm kaj elektu <7a AKE>.

# Ĉado

**Landkodo:** TD**. Mono:** CFA (XAF)**. Telefono:** 235**. Ĉefurbo:** Nĝameno (Ndjaména). **Kat.:** 1

**Areo:** 1.3 m km² (20a en la mondo). **Loĝantaro**: 13.7 milionoj; 0.7 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 8.6 homoj / km²
**Pokapa MEP:** $ 780 do en la 170a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas.

**Landa Asocio:** Ĉada Esperanto-Asocio (ĈEA), 2005 (Nealiĝinta al UEA). Prez. Nedeklarita. Membroj: 3 IM. Enlandaj membroj nedeklaritaj.
**LA-adreso:** B.P. 4573, N'Djaména
**LA retadreso:** esperanto.tchad<ĉe>yahoo.fr
**LA-hejmpaĝo:** Ne estas, Afrika retejo?

**Membraro en UEA.** 2018: 3. 2007: 3. FC 2018: 3. 2007: 3.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,22 (IM).
**Ĉefdelegito kaj Kotizperanto:**. --
**Komitatano de UEA:** Devus aliĝi.
**Sidejo:** Poŝtkesto en la ĉefurbo.

**Delegitoj:** 3 personoj (2 D, 3 FD) en du urboj: Kelo, Ndjaména.
**Aliaj asocioj:** Neniuj konataj.
**Internaciaj aranĝoj:** Neniuj konataj.

# Eburbordo

**Landkodo:** CI**. Mono:** CFA (XOF)**. Telefonkodo:** 225**. Ĉefurbo:**Yamoussoukro. **Kat.**: 1

**Areo:** 322 mil $km^2$ (68a en la mondo) **Loĝantaro**: 26 milionoj (54a); 4.39 milionoj en Abiĵano.
**Denseco**: 64 homoj / $km^2$ (139a en la mondo).
**Pokapa MEP:** $ 1 555 do en la 147a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas; ampleksas, aktuala.

**Landa Asocio:** Kotdivuara Esperanto-Asocio (KEA), 1983 (aliĝo al UEA 1989)
Prez. A.K. Kouablan. Membroj: oficiale: 1 IM; siatempa deklare: 175
**LA-adreso:** c/o A.D. Kouablan Kouassi, 02 BP 537, Abidjan 02. Ne reagas.
**LA retadreso:** kotdivoaresperanto<ĉe>yahoo.com (ne funkcias)
**LA-hejmpaĝo:** Ne estas, afrika retejo?

**Membraro en UEA.** 2018: 1. 2007: 0. FC 2018: 1. 2007: 2.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo:
**Ĉefdelegito: --**
**Kotizperanto:**.--
**Komitatano de UEA: --**
**Sidejo:** Adreso en Abidjan.

**Delegitoj:** 1 persono (1 D, 1 FD) en unu urbo: Abidjan. Devos esti remembrigita.
**Aliaj asocioj:** Neniuj konataj.
**Internaciaj aranĝoj:** Neniuj konataj.

Konsiderata nefunkcianta. AK akceptis la taskon (julio 2019) revivigi tie agadon.

# Ganao

**Landkodo:** GH**. Mono:** GHS (cedi)**. Telefonkodo:** 233**. Ĉefurbo:** Akro (Accra). Kat: 1

**Areo:** 239 m $km^2$ (80a en la mondo). **Loĝantaro**: 27 milionoj (45a); 2,3 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 101 homoj / $km^2$
**Pokapa MEP:** $ 1 517 do en la 150a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas.
**Landa Asocio:** Ganaa Esperanto-Movado (GEM), 1992 (aliĝo al UEA ne okazis) Prez.
Nedeklarita. Membroj: Enlandaj membroj nedeklaritaj.
**LA-adreso:** P.O. Box 548, Akim Oda W/A.
**LA retadreso:** Gemgh2002@yahoo.com (ne funkcias de jaroj)
**LA-hejmpaĝo:** Nenio aperas. Afrika retpaĝo?

**Membraro en UEA.** 2018:4. 2007: 4. FC 2018: 3. 2007: 4.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,07 (IM)
**Ĉefdelegito:**.Nomuminda.
**Kotizperanto:**.--
**Komitatano de UEA:** Devus aliĝi.
**Sidejo:** Adreso en Akim Oda.

**Delegitoj:** 3 personoj (2 D, 1 JD, 1 FD) en 3 urboj: Accra, Akim Oda, Tessi Accra.
**Aliaj asocioj:** ILEI (reprezentanto): A. Kobina A., <ctrcgh<ĉe>gmail.com
**Internaciaj aranĝoj:** La 3a Afrika Kongreso en 1994 en Winneba.

Iris al la Afrika Komisiono: nov 2017

# Kameruno

**Landkodo:** CM**. Mono:** CAF (XAF)**. Telefonkodo:** 237**. Ĉefurbo:** Jaundo (Yaounde)**. Kat.:** 1

**Areo:** 475 mil $km^2$ (53a en la mondo). **Loĝantaro**: 22.5 milionoj (56a); 1.4 milionoj en Douala.
**Denseco**: 40 homoj / $km^2$ (167a)
**Pokapa MEP:** $ 1 374 do en la 154a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas.

**Landa Asocio:** Association Espérantiste Camerounaise (AEC) 1991, nealiĝinta.
**LA-adreso:** B.P. 13099, Douala (Victor Nto Nto)
**LA retadreso:** ntov<ĉe>hotmail.com
**LA-hejmpaĝo:** Afrika paĝo?

**Membraro en UEA.** 2018: 3. 2007: 5.  FC 2018: 3. 2007: 5.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,133 (IM)
**Ĉefdelegito:**.--
**Kotizperanto:**. --
**Komitatano de UEA:**
**Sidejo:** --

**Delegitoj:** 3 personoj (1 D, 1 VD, 3 FD)  en 1 urbo: Douala.
**Aliaj asocioj:** Nenio konata
**Internaciaj aranĝoj:** --.

# Kenjo

**Landkodo:** KE**. Mono:** KES (ŝilingo)**. Telefonkodo:** 254**. Ĉefurbo:** Najrobio (Nairobi)**. Kat.:** 1

**Areo:** 580 m $km^2$ (48a en la mondo). **Loĝantaro**: 49 milionoj (28a); 3.4 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 78 homoj / $km^2$ (124a)
**Pokapa MEP:** $ 1 455 do en la 153a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas, senkritika, preskaŭ aktuala.

**Landa Asocio:** Kenja Esperanto-Asocio (KEA), 2009 (aliĝo al UEA ne okazis)
Prez. Nedeklarita. Membroj: Nedeklaritaj.
**LA-adreso:** Evans Ochoki, P.O. Box 9103, KE-30100 Eldoret
**LA retadreso:** keeasocio@yahoo.com (ne funkcias de jaroj)
**LA-hejmpaĝo:** Ne aperas – io afrika?

**Membraro en UEA.** 2018: 1  2007: 1.
FC 2018: 1. 2007: 1.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,02 (IM),
**Ĉefdelegito:**. --
**Kotizperanto:**. --
**Komitatano de UEA:** Devus aliĝi.
**Sidejo:** Ne estas.

**Delegitoj:** 1 persono (1 D, 1 FD)  en 1 urbo: Cwele.
**Aliaj asocioj:** ILEI (kontaktpersono):
Gilbert Sikala, <simiyugilbert<ĉe>yahoo.com
**Internaciaj aranĝoj:** --



Potenca komunikilo tra la tuta Afriko:
Radio. Foto de Joel Muhire en DR Kongo.

Supozanta ne fukcianta.

# Komoroj

**Landkodo:** KM**. Mono:** KMF (komora franko)**. Telefonkodo:** 269. **Ĉefurbo:** Moronio **(**Moroni). Kat.: 1. **Popolo:** 1 m.
**Membroj:** UEA 2 IM. **Delegitoj:** 2. Sen Asocio.

# Kongo DR

**Landkodo:** CD**. Mono:** CDF (franc)**. Telefonkodo:** 243**. Ĉefurbo:** Kinŝaso (Kinshasa). **Kat.**: 1.

**Areo:** 2,3 m km² (11a en la mondo). **Loĝantaro**: 82 milionoj (16a); 11 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 35 homoj / km²
**Pokapa MEP:** $ 512 do en la 185a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas, senkritika, aktuala.

**Landa Asocio:** Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA), 1963 (aliĝo al UEA 1966). Prez. J.P. Lungikisa. Sekr.:Mafuila Mavomo Jackson. Membroj: UEA: 50 AM + 24 IM, sume 74; siatempe deklare: 493
**LA-adreso:** P.B. 1007, Kinshasa Limeté (Kinŝasa).
**LA retadreso:** vekigho@gmail.com (iras al la sekretario)
**Aliaj retadresoj:** JP_Lungikisa<ĉe>yahoo.fr aŭ dkeaprezidanto2010<ĉe>gmail.com
**LA-hejmpaĝo:** Ne estas, ĉu afrika paĝo?

**Membraro en UEA.** 2018: 24. 2007: 11. FC 2018: 19. 2007: 11.
**Ĉefdelegito:**.Nomuminda.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 6.01 (LA), 0,159 (IM)
**Kotizperanto:**. --
**Komitatano de UEA:** Havas observanton (Mavomo – ĝis 2022)
**Sidejo:** Adreso en Kinŝaso.

**Delegitoj:** 4 personoj (2 D, 1 VD, 3 FD) en 2 urboj: Kinŝasa, Kuilu-Ngongo.
**Aliaj asocioj:** TEJO (DKEJO depost 1990), ILEI (sekcio). Mafuila Mavomo, <mavomespero<ĉe>gmail.com.
**Internaciaj aranĝoj:** La 13a AMO-seminario en Kinŝaso en 2015. Vidu la foton:



# Madagaskaro

**Landkodo:** MG**. Mono:** MGA (ariary)**. Telefonkodo:** 261**. Ĉefurbo:** Antanarivo.  **Kat.:** 1

**Areo:** 587 mil km$^2$ (46a en la mondo). **Loĝantaro**: 24.5 milionoj (52a); 1.4 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 35 homoj / km$^2$ (147a)
**Pokapa MEP:** $ 451 do en la 188a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas.

**Landa Asocio:** Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj (UME), 1960 kaj 2001 (aliĝo al UEA 2006)
Prez. H. Fidilalao. Membroj: UEA: 7 IM; siatempa deklaro: 70
**LA-adreso:** Henriél Fidilalao, Lot IAH 32 bis Avaratsena, MG-102 Ambohidrapeto
**LA retadreso:** fidilalao<ĉe>yahoo.fr
**LA-hejmpaĝo:** Ne anoncita – io afrika?

**Membraro en UEA.** 2018: 7. 2007: 9.  FC 2018:6. 2007: 8.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 2,86 (LA), 0,122 (IM)
**Ĉefdelegito:**. Ne estas.
**Kotizperanto:**.Ne estas.
**Komitatano de UEA:** Perdis la rajton nomumi  observanton.
**Sidejo:** Adreso en Ambohidrapeto.

**Delegitoj:** 5 personoj (1 D, 1 VD, 4 FD)  en 1 urbo: Antanarivo.
**Aliaj asocioj:** TEJO (JEOM), ILEI (kontaktpersono)
**Internaciaj aranĝoj: --**

# Malio

**Landkodo:** ML**. Mono:** CFA (XOF)**. Telefonkodo:** 223**. Ĉefurbo:** Bamako. **Kat.** 1.

**Areo:** 1.24 m km$^2$ (23a en la mondo) **Loĝantaro**: 14.6 milionoj (67a); 1.3 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 11.7 homoj / km$^2$
**Pokapa MEP:** $ 778 do en la 171a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas, senkritika, aktuala.

**Landa Asocio:** Malia Esperanto-Movado (MEM), 2005 (aliĝo al UEA petinda).
Prez. Ne deklarita. Membroj: UEA IM: 2. Enlande ne deklaritaj.
**LA-adreso:** BP 2382, Bamako
**LA retadreso:** drissa_fiayorod<ĉe>yahoo.fr
**LA-hejmpaĝo:** Ne aperas: afrika paĝaro?

**Membraro en UEA.** 2018: 2. 2007: 1.  FC 2018: 1. 2007: 1.
**Membroj de UEA** kiel procentaĵo de la popolo: Praktike nulo.
**Ĉefdelegito:** Ne estas
**Kotizperanto:**. Ne estas
**Komitatano de UEA:** Rajtus je observanto, se 15 membroj ekzistus kaj estus iel pagitaj.
**Sidejo:** Adreso en Bamako.

**Delegitoj:** 1 persono (1 D)  en 1 urbo: Bamako.
**Aliaj asocioj:** Ne konataj.
**Internaciaj aranĝoj: --**

Drissa ne plu IM de UEA. AK okupiĝas.

# Niĝerio

**Landkodo:** NG**. Mono:** NGN (naira)**. Telefonkodo:** 234**. Ĉefurbo:** Abuĝo (Abuja). **Kat:** 1.

**Areo:** 923 mil $km^2$ (23a en la mondo). **Loĝantaro**: 186 milionoj (11a); 8 milionoj en Lagos.
**Denseco**: 197 homoj / $km^2$ (71a)
**Pokapa MEP:** $ 2176 do en la 135a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas.

**Landa Asocio:** Esperanto-Federacio de Niĝerio (EFN), 1995 (aliĝo al UEA 2005).
Prez. Demain Echefu. Membroj: UEA:50 AM, 3 IM; sume 53. Iama deklaro: 142
**LA-adreso:** P.O. Box 3059, P H Oguinye, C460001 Owerri, Imo State.
**LA retadreso:** efen_2002<ĉe>yahoo.co.uk
**LA-hejmpaĝo:** Ne aperas: afrika paĝaro?

**Membraro en UEA.** 2018: 10. 2007: 7. FC 2018: 3. 2007: 5.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,76 (LA), 0,05 (IM)
**Ĉefdelegito:**.Ne estas. Nomuminda?
**Kotizperanto:**.--
**Komitatano de UEA:** Observanto de UEA ĝis 2022: P. Oguinye.
**Sidejo:** Adreso en Owerri.

**Delegitoj:** 3 personoj (2 D, 1 FD) en 3 urboj: Badagry, Ibadan, Owerri.
**Aliaj asocioj:** Nenio konata.
**Internaciaj aranĝoj:** --

# Niĝero

**Landkodo:** NE**. Mono:** CFA (XOF)**. Telefonkodo:** 227**. Ĉefurbo:** Niameo (Niamey). **Kat.:** 1

**Areo:** 1.27 m $km^2$ (21a en la mondo). **Loĝantaro**: 20.7 milionoj (61a); 708 mil en la ĉefurbo.
**Denseco**: 12 homoj / $km^2$
**Pokapa MEP:** $ 364 do en la 191a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, statistike malaktuala. Landkodo ne konformas al ISO-normo.

**Landa Asocio:** Niĝerlanda Esperanto-Klubo (NEK), nealiĝinta al UEA.
**LA-adreso:** B.P. 5002, Niamey, Niĝero
**LA retadreso:** nekesperanto@gmail.com
**LA-hejmpaĝo:** Ne aperas, eble tra ILEI?

**Membraro en UEA.** 2018: 2. 2007: 3. FC 2018: 2. 2007: 3.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,1 (IM)
**Ĉefdelegito:**. --
**Kotizperanto:** --
**Komitatano de UEA:** necesus aliĝo.
**Sidejo:** --

**Delegitoj:** 2 personoj (1 D, 1 VD) en 1 urbo: Niamey.
**Aliaj asocioj:** ILEI (reprezentanto): Boukari Ellias B., <elliasdj<ĉe> gmail.com>
**Internaciaj aranĝoj:** Neniu konata.

# Senegalo

**Landkodo:** SN**. Mono:** CFA (XOF)**. Telefon-kodo:** 221**. Ĉefurbo:** Dakaro (Dakar). **Kat.:** 1




**Areo:** 197 mil km² (86a en la mondo). **Loĝantaro**: 15.4 milionoj (72a); 1 miliono en la ĉefurbo.
**Denseco**: 69 homoj / km² (134a)
**Pokapa MEP:** $ 948 do en la 165a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, statistikoj tre malaktualaj. Landkodo ne konformas al ISO-normo.

**Landa Asocio:** Senegala Esperanto-Asocio (SEA), 2011 (aliĝo al UEA ne okazis).
**LA-adreso:** BP 1186, Rufisque.
**LA retadreso:** damanemanu2000<ĉe>yahoo.fr
**LA-hejmpaĝo:** Ne estas, afrika adreso?

**Membraro en UEA.** 2018: 2. 2007: 1. FC 2018: 1 FC 2007: 1. Kreskos en 2019!
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,06 (IM)
**Ĉefdelegito:** --
**Kotizperanto:** --
**Komitatano de UEA:** Devus aliĝi.
**Sidejo:** Adreso en Rufisque.

**Delegitoj:** 1 persono (1 D) en 1 urbo: Rufisque
**Aliaj asocioj:** ILEI (sekcio aldonita en 2018): Assane Faye ĉe la asocia retejo.
**Internaciaj aranĝoj:** --

UEA ricevis por 2019 liston de 25 enlandaj membroj, duono traktitaj per Fondaĵo Canuto, duono sen la fondaĵo. Potencialo por kreski, ĉu ĉe UEA, ĉu ĉe ILEI. Tiuj enlandaj membroj havas tre aktivan diskutadon en *Facebook*. Esence la membroj troviĝas en Dakar kaj la najbara Rufisque kaj Gorom (ĉ. 200 km. for de la ĉefurbo) apud Touba sur la mapo. Pardonu la tekstojn ne en Esperanto, sed mallongas la vivo.

# Sud-Afriko

**Landkodo:** ZA**. Mono:** ZAR (rand)**. Telefonkodo:** 27**. Ĉefurbo:** Pretorio (Pretoria). **Kat.:** 2

**Areo:** 1.2 m km² (24a en la mondo). **Loĝantaro**: 55 milionoj (25a); 4.4 milionoj en Johannesburg.
**Denseco**: 42 homoj / km² (169a)
**Pokapa MEP:** $ 5 105 do en la 97a loko en la mondo. Membro de la BRICS-grupo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, ricevis laŭdon, evitas efemerajn statistikojn.

**Landa Asocio:** Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA), 1962 (aliĝo al UEA 1969).
Prez. J. Cloete. Membroj: UEA: 19, AM 19 +IM 6, sume 25; iama deklaro: 54.
**LA-adreso:** 211 Oak Ave, ZA-2194 Randburg, Apud Pretoria (adreso de la prezidanto)
**LA retadreso:** oskaro<ĉe>mweb.co.za aŭ julian99@iburst.co.za
**LA-hejmpaĝo:** www.esperanto.org.za.

**Membraro en UEA.** 2018: 6. 2007: 6. FC 2018: 2 FC 2007: 2.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,42 (LA), 0, 13 (IM).

**Ĉefdelegito:**. H. von Blottnitz.
**Kotizperanto:**. C. Beckford.
**Komitatano de UEA:** Havas observanton: Beckford.
**Sidejo:** Adreso en Pretoria, kiu apartenas al Oscar Sher)

**Delegitoj:** 4 personoj (1 ĈD, 3D, 2 FD) en 3 urboj: Cape Town, Durban, Pretoria.
**Aliaj asocioj:** ILEI (kontaktpersono: Emile Malanda Nianga <emalandan<ĉe> yahoo.com>)
**Internaciaj aranĝoj:** --

# Svazilando

**Landkodo:** SZ**. Mono:** SZL kaj ZAR**. Telefonkodo:** 268**. Ĉefurbo:** Mbabano. Kat 2.
Nova nacilingva nomo: eSwatini (kiu ja signifas Svazilando).

**Areo:** 17 mil km² (154a en la mondo). **Loĝantaro**: 1.3 milionoj (154a); 110 mil en Manzini.
**Denseco**: 68 homoj / km² (135a)
**Pokapa MEP:** $ 2 963 do en la 126a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas sed minimuma.

**Landa Asocio:** Ne estas. Sen membroj en UEA.
**LA-adreso:** --
**LA retadreso:** --
**LA-hejmpaĝo:** Ne estas.

**Membraro en UEA.** 2018: 0. 2007: 1. FC 2018: 0.1 FC 2007: 1.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,77 (IM)
**Ĉefdelegito:** --
**Kotizperanto:** --
**Komitatano de UEA:** Ne estas
**Sidejo:** Ne estas.

**Delegitoj:** 1 persono (1 D) en 1 urbo: Mbabane
**Aliaj asocioj:** Ne konataj.
**Internaciaj aranĝoj:** --

Esplorata, ĉu realigi la ĝisnunan membron.

# Tanzanio

**Landkodo:** TZ**. Mono:** TZS (ŝilingo)**. Telefonkodo:** 255**. Ĉefurbo:** Dodomao (Dodoma) **Kat.** 1

**Areo:** 947 mil km² (31a en la mondo). **Loĝantaro**: 51.8 milionoj (28a); 4.4 milionoj en Daresalamo (Dar-es-Salaam)

**Denseco**: 48 homoj / km² (134a)
**Pokapa MEP:** $ 881 do en la 167a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas kaj ampleksas, senkritika, aktuala.

**Landa Asocio:** Tanzania Esperanto-Asocio (TEA), nealiĝinta al UEA sed jure registrita. Prez.: Nedeklarita. Membroj: Nedeklaritaj.
**LA-adreso:** P.O. Box 14187, Att. Mr. Matabaro Minani S., Dar-es-Salaam.
**LA retadreso:** esperantotz<ĉe>gmail.com
**LA-hejmpaĝo:** Ne aperas. Afrika paĝaro?

**Membraro en UEA.** 2018 6. 2007: 10. FC 2018: 6 FC 2007: 10. 2019: 9
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: -- (LA), 0,25 (IM)
**Ĉefdelegito:**. Ne estas –nomuminda.

**Kotizperanto:**. Ne estas – nomuminda.
**Komitatano de UEA:** Devus aliĝi kun minimume 15 membroj.
**Sidejo:** Adreso en Dar-es-Salaam.

**Delegitoj:** 8 personoj (5 D, 2 VD, 4 FD) en 5 urboj.
**Aliaj asocioj:** ILEI (sekcio): Mulele Mbassa <mulelembassa<ĉe>gmail.com
**Internaciaj aranĝoj:** La 4a Afrika Kongreso en 1995 en Arusha Moshi; la 6a Afrika Kongreso en 2016 en Bunda (foto sube) kiu enhavis AMO-seminarion 29:



# Togolando

**Landkodo:** TG. **Mono:** CFA (XOF). **Telefonkodo:** 228. **Ĉefurbo:** Lomeo (Lomé)/ Kat.: 1

**Areo:** 56 mil km² (123a en la mondo). **Loĝantaro**: 7.6 milionoj (101a); 0,75 m en la ĉefurbo.
**Denseco**: 125 homoj / km² (69a)
**Pokapa MEP:** $ 585 do en la 182a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas… kaj ampleksas, senkritika, aktuala.

**Landa Asocio:** Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE), 1987 (aliĝo al UEA 1995) Prez. A. Kokou. Membroj:UEA: AM 50 + IM 18; sume 68. Iama deklaro: 300
**LA-adreso:** B.P. 12.096, Lomé.
**LA retadreso:** utetogo<ĉe>hotmail.com
**LA-hejmpaĝo:** https://unuighotogolandaporesperanto.jimdo.com/ en Esperanto kaj la frnca.

**Membraro en UEA.** 2018: 18. 2007: 22. FC 2018: 18 FC 2007: 19.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 39.47 (LA), 4,61 (IM)
**Ĉefdelegito:** Ne estas. Indus nomumi iun.
**Kotizperanto:**. --
**Komitatano de UEA:** Havis observanton: Gbeglo Koffi.
**Sidejo:** Adreso en Lomeo. Eble estas oficejo. Estas lernejo.

**Delegitoj:** 11 personoj (8 D, 1 VD, 7 FD) en 8 urboj.
**Aliaj asocioj:** TEJO (JOTE), ILEI (sekcio): A. Agbemadon, <abiovamensah<ĉe>yahoo,com>

**Internaciaj aranĝoj:** La 1a Afrika Kongreso en 1990 en Notose; la 73a IJK en 2017 en Aneho (vidu la foton.).




# Ugando

**Landkodo:** UG**. Mono:** UGX (ŝilingo)**. Telefono:** 256**. Ĉefurbo:** Kampalo (Kampala). **Kat:** 1

**Areo:** 241 mil km² (79a en la mondo). **Loĝantaro**: 37 milionoj (35a); 1.5 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 157 homoj / km²
**Pokapa MEP:** $ 610 do en la 180a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, ne tre ampleksa, statistikoj neaktualaj.

**Landa Asocio:** Uganda Esperanto-Asocio, nealiĝinta al UEA.
**LA-adreso:** P.O. Box 12815, Kampala, Ugando
**LA-retadreso:** esperantokwetu@yahoo.com (ne funkcias)

**Membraro en UEA.** 2018: 1. 2007: 3. FC 2018: 0 FC 2007: 3.
**Membroj de UEA** kiel milionaĵo de la popolo: 0,05 (IM)
**Ĉefdelegito:** --
**Kotizperanto:** --
**Komitatano de UEA: --**
**Sidejo:** --

**Delegitoj:** 1 persono (1 JD) en 1 urbo: Bunagana
**Aliaj asocioj:** Neniu konata.
**Internaciaj aranĝoj: --**

==================
Interesaj retejoj:
Retejo de la Afrika Komisiono: https://www.esperanto-afriko.org/afrikakomisiono.htm
https://senopone.wordpress.com/ Muziko el DR Kongo
====================

Afrikaj landoj, kiuj rajtus je observanto, sed ne nomumis tion devus tion fari – sufiĉas entute deklari 15 membrojn. (AM kaj IM). En la epoko de multa komitata laboro per la reto, nomumo de observantoj malfermus la pordon al la komitata informfluo.

]

## Rekomendoj de la 29a AMO-seminario

### okazinta en Bunda en decembro 2016

1. La Afrika Komisiono kaj UEA (AK) celu realigi unu AMO-seminarion ĉiujare.
2. Afrikaj landoj kun movado sed sen konsilanto nomumu tiun.
3. UEA esploru la eblojn, ke TEJO kaj la LA en Tanzanio kunlaboru por krei svahillingvan version de la eksterrilata informilo havebla en multaj lingvoj.
4. UEA esploru la eblon kaj indon eldoni kompletigitan version de la svahillingva lernilo de Nino Vessella aŭ prizorgi la aperigon de nova lernolibro.
5. Lokaj kaj regionaj grupoj kaj landaj asocioj raportu pli regule pri siaj agadoj kaj atingoj, al la Afrika Komisiono kaj E-revuoj tra la mondo.
6. UEA kaj la organizantoj de KER-ekzamenoj esploru eblojn por ekzamena sesio en Afriko.
7. ILEI intensigu la okazigon de ekzamenoj UEA/ILEI en Afriko por atesti lingvan kapablon kaj krome iel atesti la instrukapablon de afrikanoj.
8. En la instruado de Eo, oni pli forte emfazu la rolon de verboj kaj ĉiam prezentu ilin al lernantoj en adekvata maniero kaj kunteksto.
9. UEA kaj la Afrika Komisiono esploru eblojn starigi instituton aŭ similan projekton, kiu permesas al afrikaj esperantistoj praktike uzi la lingvon por plustudi.

18 landoj prezentitaj. La landoj de la norda Afriko (la Magrebo) esas troveblaj ĉe nia regiono MONA. Temas pri Egiptio, Libio, Tunizio, Alĝerio kaj Maroko.

Fonto por ciferoj de MEP: La anglaligva Vikipedia paĝo por la lando. Temas pri la nominala GDP. Fonto por la rangigo: Kiel supre aŭ manke de informo tie https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_(nominal)_per_capita, laŭ la listigo de UN.

La listo de kontinentaj kongresoj estas petebla de la redaktoro de ĉi tiu raporto.

La membroj de la Afrika Komisiono elektita post Lahti:

**Kunordiganto:** S-ro François Hounsounou, Benino
**Vickunordiganto:** S-ro Gilbert Niyukuri, Burundo
S-ro Joel Muhire Ndaziboneye, DR Kongo
S-ino Miora Raveloharison, Madagaskaro
S-ro Moses Gbetogo Opa, Niĝerio
S-ro Viktor Ntonto, Kameruno
S-ro Adjévi Adjé, Togolando
S-ro Cedrick Irakoze, Kenjo

*Fotoj kaj mallongaj prezentoj aperis en revuo* Esperanto *de oktobro 2019, p. 197.*

La komisionanoj post Nitra en 2016, mandato ĝis 2019.

S-ro Emile Malanda el Suda Afriko (Kunordiganto)
S-ro Francois Hounsounou el Benino (Vickunordiganto)
S-ro Arlain Kizeyidioko el Kongolando (Sekr.) arlainmayinda@gmail.com
S-ino Adeline Tony Umutoni el Ruando
S-ino Alexandrine Omba Tshamena el Kongolando
S-ro Assane Faye el Senegalo
S-ro Alfred Arthur el Ganao
S-ro Doumegnon Koffi el Togolando
S-ro Hassano Ntahonsigaye el Burundo
S-ro Adjevi Adje el Togolando

SMG versio 1:  30 sept 2017. Versio 2: nov 6
Versio tri kun bildoj, iris al la Komitato, nov 15.
Versio 4 por publikigo: jan 23; Versio 5, jan 29.
Plenlasta ĝisdatigo: nov 13, 2019.
============================
V2: Membronombroj ĝisdatigitaj (AM kaj IM) laŭ la oficiala kalkulo por 2017 (RE majo 2018)
V2: Ciferoj por MEP kaj monda rango prenitaj el la statistikoj de UN.
V2 unuecigo kun JL 2018.